

# ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO-FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Sechster Jahrgang



Nr. 6 Juni 1953

## LA GERMANAJ ESPERANTISTOJ EN FRANKFURTO

Tropika varmego regis ĉie, kiam la Kolonja vagonaro fulmrapide preterpasis Rüdesheim kaj eniris la ebenaĵon de Wiesbaden. Tagmeze mi trairis la barilon en la ĉefstacidomo Frankfurt. Kia homamaso! Kion signifas tio? Miloj da homoj, viroj, virinoj, junaj kaj maljunaj, travagis kantante, ridante, babilante la stacidomon. Ĉu jam tiom da Esperantistoj alvenis? Mirige! — Ho ve! Iom da seniluziĝo: ne ĉiuj estas Esperantistoj, sed sudetgermanoj, kiuj kunvenis dum Pentekosto en Frankfurt.

Mi forlasis la stacidomon. Komprenoble mi unue devis plenumi la ordonon de la stomako. Post formeto de mia pakaĵo mi hazarde trovis grandan restoracion, laŭ tipe bavara stilo, el kiu sonis vigla same tipa bavara blovmuziko, kiu min forte altiris. Enirinte mi surprize ekvidis alpan scenejon kun kuliso de bavaraĵoj. Dekduo de nemalfortaj bavaraĵoj „Seppl“ prilaboris siajn muzikinstrumentojn laŭ verva marŝritmo. Bruo, eĉ bruego!

La ejo estis plenplena, multaj gastoj jam manĝis kaj trinkis. Mi sidigis por forigi mian malsaton kaj soifon. Kun nova forto mi promenadis ĉe la bela Main-bordo inter arboj kaj parkopartoj.

Vespere mi renkontis kelkajn agemajn kongresanojn, kaj tre baldaŭ vigla konversacio esperantlingva ekestis. Ni disigis nur antaŭ noktomezo.



Foto: ILLUS, Berlin

Intertempe oni pendigis grandan Esperanto-flagon inter la naciaj flagoj flirantaj antaŭ la stacidomo. Ankaŭ sabaton matene la suno senkompatate sendis siajn radiojn en la stratojn de Frankfurt. La kongresa akceptejo funkciis en „Verkehrsverein“ lokita en la antaŭhalo de la stacidomo. Tien mi nun iris por akcepti miajn kongresdokumentojn kaj la insignon. Cetere — la kongres-insigno de la „Sudetgermanoj“ tregege similis al tiu de la Esperantistoj. Do, tiuj el niaj gesamideanoj, kiuj bonŝancis kaj estis iom ruzaj, sukcesis akiri la malmultekostan tuttagan trambileton destinitan por la sudetgermanoj. Sed bonŝancon oni vere bezonis por tiu akir-ebleco! Bedaŭrinde mi ne apartenis al la bonŝanculoj.

Laŭ la programo estos aranĝata kunsido de la pli vasta estraro en restoracio „Tannenbaum“ sabaton posttagmeze. La elektita ĉambro bedaŭrinde estis tro malgranda, kaj la partoprenantoj devis ŝviti dum la kunsido ĝis post noktomezo. La diversaj pritraktitoj estis tiel viglaj kaj kelkfoje tiom pasiaj, ke oni efektive forgesis vespermanĝi.

Dum en la tro malgranda „Tannenbaum“ la estraranoj ŝvitegis, la amaso de la esperantistoj rapidis — aŭ pli bone veturis — al la interkonatiga vespero, ĉar tia jam estas tradicia por Esperanto-kongreso. Ĉi-foje ĝi okazis en la „Agrikultura Ministrejo“; en agrabla



La nova prezidanto de GEA  
Oberamtsrichter Dr. Wilhelm Herrmann

salono kolektiĝis granda aro da kongresanoj, inter ili kelkaj LKK-anoj. Ĉiuj estraranoj mankis, ĉar ili suferis dum longegaj, senfinaj preparoloj rilate la estintecon kaj estontecon de GEA. Strange, dum la interkonatiga vespero en München en 1951 la muzikistoj kaŭzis tiel fortan bruon, ke eĉ ne unu esperantisto sukcesis kompreni sian propran vorton. En Frankfurt oni agis pli singarde: oni tute simple rezignis la muzikon. Kaj ili bone interkonatiĝis, la geesperantistoj, kiuj ankoraŭ ĝis tiam ne konis sin reciproke.

Al la evangelianoj la CVJM-organizo disponigis agrablan ejon por la diservo. P. Hübner, germana sekiestro de KELI, kiu en lasta minuto devis anstataŭi la pastron, bone plenumis sian taskon. Post komuna kantado s-ano Hübner parolis en kortuŝaj vortoj pri la Dia Amo laŭ la 13a ĉapitro de la Korintanoj. Oni finis per komunaj preĝo kaj kanto. — Restis ankoraŭ sufiĉe da tempo por aranĝi en ĉeesto de KELI-membroj la negocajn aferojn kaj por publikigi la kasraporton de la germana sekcio de KELI.

La katolikaj esperantistoj renkontiĝis por sia diservo en St. Antonius-preĝejo, Savignystrato: ĉio estis bone preparita, kaj la esperantlingva prediko forte impresis ĉiujn korojn.

Kiel ĉiam dum Esperanto-kongreso oni devis rapidi de unu kunveno al alia. La solenan malfermon de la kongreso en la aŭlo de la universitato mi tamen atingis frutempe. En la antaŭhalo de la kongresejo mi trovis samideanaron vigle konversaciantan. Rapide la aŭlo pleniĝis, kaj baldaŭ eksonis belega orgenludo, altenlevanta la spiritojn de la ĉeestantoj en ĉi tiu sunbrila pentekosta festotago. Saluti la kongresanaron nome de LKK s-ano Wolter, Frankfurt. Kiel reprezentanto de la ĉefurbestro d-ro Kolb parolis per elokventaj vortoj urba konsilisto Graeser, ofte tuŝante la idearon de Goethe, plej granda filo de la kongresurbo. Sekvis salutparoloj de nia franca samideano Jacques Martinet, Lille, de nia nederlanda pioniro van der

Haan, krome de nia s-ano Gahler kiel reprezentanto de la sudetgermanaj esperantistoj. Komisiito de la SPD transdonis la dezirojn de sia partio.

Elstara punkto de la malferma kunsido estis la festparolado de la asocia prezidanto D-ro Ziegler, kiu per vervaj vortoj alvokis la samideanaron al energia daŭrigo de la laboro por nia celo. Li akcentis, ke nia ideo malgraŭ longjara subpremado kaj senfinaj malhelpoj pruvigis nevenkebla kaj senhalte sekvosian vojon al alta celo: interkompreniĝo de ĉiuj popoloj. Kompreneble lingvo sola ne kapablas krei tutmondan pacon; tamen Esperanto estas valora faktoro por la interpacigo de la homaro. La genia kreaĵo de D-ro Zamenhof vere respegulas altajn ideojn de Goethe, kaj ĉiu esperantisto estas mond-civitano en la plej vasta senco de ĉi tiu vorto. D-ro Ziegler fine esprimis la deziron ke Esperanto baldaŭ estu akceptata en la instru-plano de la lernejoj. Longa aplaŭdo sekvis la bonegan paroladon. Impresa orgenludo de blinda samideano finis la solenaĵon je tagmezo.

Car la unua parto de la ĉefa jarkunsido devis komenciĝi je 14.50 h. oni rekomendis tagmanĝon proksime de la universitato. — cetere problemo pro tio, ke la „Mensa“ de la universitato ne funkciis dum la festotagoj kaj nur en lasta minuto reprenis sian promeson pri pretigo de la tagmanĝoj. Sed ankaŭ ĉi tiu problemon la LKK solvis en kontentiga maniero, ebligante almenaŭ al parto de la kongresanoj tagmanĝi en najbara gimnastikhalo.

Malgraŭ la eĉ kreskanta varmego la kongresanaro ŝvitante kolektiĝis posttagmeze je la fiksita tempo en la universitato. Malfermis la ĉefan jarkunvenon la prezidanto D-ro Ziegler. Post interkonsento pri la metodo de la voĉdonado li konigis la tagordon enhavantan cetere pli ol unu malfacilan programeron, pri kiu jam diskutis la pli vasta estraro dum multhoraj debatoj en la antaŭa tago. Trovi kontentigan solvon de ĉiuj problemoj ankaŭ dum la publika kunsido ne estis eble, kaj kelkfoje eĉ estiĝis malkonkordoj, kiel okazas ĉiam, kiam la malsameco de la opinioj estas tro sentebla. Finfine eĉ esperantistoj estas ja nur homoj!

Rapide forkuregis la horoj, kaj kiam la kunsido finiĝis je la 19-a h. restis ankoraŭ amaso da laboro por la sekvanta pentekosta lundo. Oni kunsidis de la mateno ĝis malfrua posttagmezo, escepte de mallonga interrompo por la tagmanĝo. Post fino de la debatoj oni per skriba voĉdonado malsarĝis la ĝisnunan estraron (622 kontraŭ 391 voĉoj).

Je la bedaŭro de multaj esperantistoj D-ro Ziegler deklaris, ke li ne povos akcepti reelekton. Sekve de tio estis necese tuja elekto de nova prezidanto por GEA: oni trovis lin en la persono de la supera distrikt-juĝisto D-ro Wilhelm Herrmann, Lampertheim (elekta per 666 kontraŭ 60 voĉoj kaj 48 sindetenoj). En sia debuta parolado li plej kore dankis al la eksigintaj prezidanto kaj estraro pro la grandaj penoj en la intereso de nia movado. Li petis senescepte ĉiujn pri

## „Verdaj“ raporto el la tuta mondo

La 39-a Universala Kongreso  
de Esperanto okazos en Haarlem,  
Nederlando

Jugoslavijaj sendstacioj disradias  
Esperanton

Osijek dissendas regule ĉiudimanĉe, je 9.24—9.30 h., ondo 202,2 m. (Ne estas aŭdebla eksterlande.)

Zagreb regule elsendas ĉiujauĉde je 0,05 h. (mezeŭropa tempo) dum 15 minutoj; ondolongo 264,7 m.

Novaj Esperanto-societoj  
en Jugoslavio

La unua Esperanto-societo en Makedonio formiĝis en ĝia ĉefurbo Skopje kaj ricevis la nomon „La Progreso“. En la unuaj du kursoj enskribiĝis 120 personoj.

En la plej okcidenta regiono — Slovenio Primorje — fondiĝis societo en Solkan-Nova Gorica.

En Zagreb refondiĝis Laborista Esperanto-Societo (LES). Antaŭ la milito tiu laborista societo estis tre aktiva.

IFEF,

la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, havis sian sukcesan 5-an kongreson en Utrecht, Nederlando, je 5.—10. 5. 1953.

La Societo de Aŭstrijaj  
Esperanto-Instruistoj

direktis alvokon al 32 landaj junularaj ruĝkrucaj organizoj, atentigante ilin pri la grandegaj avantaĝoj de Esperanto por la celoj de la Ruĝa Kruco.

En la Esperantista Kulturdomo  
en Grésillon (Francujo)

kunvenis dum Pasko 1953 kongreso de esperantistaj edukistoj (GEE).

En Dresdno

15 gesamideanoj el 10 lokoj renkontiĝis fine de Marto okaze de nunjara artekspozicio de la sovjeta zono germana.

Kardinalo kaj episkopo  
en honoraj komitatoj

D-ro Th. Innitzer, kardinalo kaj ĉefepiskopo de Vieno, aliĝis al la Honora Komitato de la 24-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Lurdo (Lourdes).

D-ro J. Köstner, episkopo de Klagenfurt, aliĝis al la Protektora Komitato por la nunjara Aŭstria Esperanto-Kongreso.

Informoj de Internacia Esperanto-  
Muzeo Wien

Estas intencite en julio 1955 eldoni adresliston de la vivantaj Esperanto-Veteranoj, t. e. gesamideanoj esperantistiĝintaj antaŭ 1914. Veteranoj sendu foteton, vivpriskribon kaj adreson tuj al IEMW, kiu transdonos ĉion al VEK (Veterana Esperantista Klubo, hon. sekr. s-ano Lewin, 33 Kingscroft Ave, Dunstable, Britujo). Aneco al VEK estas senpaga, insigno kontraŭ 4 internaciaj respondkuponoj. — In-

formilo de IEMW, kvarfoje jare 6 resp. kuponoj.

### Kiel veturi al Zagreb? Kongres-partoprenontoj bonvolu legi!

Por la veturado al Zagreb el la landoj Anglio, Belgio, Danio, Norvegio, Svedio kaj Germanio ekzistas nur unu trajno, la t. n. „Täuern-Ekspresso“ (Ostende 21.00; Bruxelles 22.35; Köln 2.30; München 11.05; Zagreb 23.20). Por doni al ĉiuj gesamideanoj oportunan sidlokon, la Germana Federacia Fervojo intencas aligi apartajn vagonojn (eble de Munkeno aŭ de Hamburgo) se sufiĉa nombro da partoprenontoj sin anoncos. Pro tio ĉiuj interesuloj el la supre menciitaj landoj estas petataj, kiel eble plej baldaŭ, sed nepre ĝis la 10a de julio, komuniki al s-ano. J. Gressner, Ravensberger Str. 117, Bielefeld Germanio, ĉu ili intencas veturi per la „Täuern-Ekspresso“ je la 23a, 24a aŭ 25a de julio. Antaŭ ĉio tio gravas por grupoj! Pripensu, ke samtempe oni en ĉiuj landoj ferias, do la trajnoj estos plenplenaj. Demandoj pri tiu ĉi afero nur escepte povos esti respondataj kaj nur, se reafranko estos aldonata.

### Publika kunveno de la akademio dum la Universala Kongreso en Zagreb

En la kadro de la 38-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb okazos publika kunveno de la Akademio, en kiu la partoprenantoj havos la okazon direkti prilingvajn demandojn al la Akademio kaj libere diskuti pri lingvaj aferoj.

Proponoj por la tagordo de tiu kunveno devas esti sendataj al la adreso de la Akademio almenaŭ antaŭ la fino de Junio. Ili povas esti duspecaj:

1. Oni povas formuli demandon pri iu lingva problemo rilata al Esperanto, pri kiu la Prezidanto kaj la aliaj

# Germanaj esperantistoj!

Dum la Pentekosta Kongreso de la GEA per la voĉoj de la plimulto mi estas elektita kiel prezidanto. Mi ne estus riskinta akcepti ĉi tiun postenon en nia movado, se el la nombro de la voĉoj por mi, mi ne povus ekkoni, ke oni donas al mi la konfidon, kiun la unua reprezentanto de nia asocio bezonas por sukcesplene labori.

Pro la nuntempa politika situacio en la tutmondo kaj en Eŭropo la Esperanto-movado troviĝas en decida stadio. Dank' al la klopodoj de niaj amikoj en USA, la Unesko, la mondskala kultura organizaĵo de la Unuigintaj Nacioj, venontjare decidus pri la Esperanto-petskribo post enketo inter la membroj-ŝtatoj. Sed bedaŭrinde ni devas timi, ke la decido de la Unesko estos malfavore influata per la lingva evoluo en Eŭropo. Kvankam la unuigota Eŭropo urĝe bezonas lingvan integrilon en formo de neŭtrala lingvo, ŝajnas, ke la tempoj ankoraŭ ne pasis, dum kiuj pro nacia egoismo oni kufimis altrudi sian lingvon al aliaj popoloj. Al Eŭropo-Konsilaro oni faris denove la proponon, solvi la eŭropan lingvo-problemon per angla-franca du-lingvismo. Kion signifus la venko de ĉi tiu propono, ĉiu esperantisto tuj ekkonos. La Eŭropo-Konsilaro decidus pri la menciita propono jam dum sia ĉi-jara septembra sesio. Do estos nia ĉeftasko fari ĉion eblan, pro rebati ĉi tiun atakon, por ke la vojo restu libera al oficialigo de nia vere neŭtrala kaj fakte „alteŭropa“ lingvo en nia kontinento.

Kunhelpi mi vokas ĉiujn germanajn esperantistojn, precipe vin GEA-anojn! Restu fidelaj al nia asocio!

La prezidanto de la GEA  
Dr. Herrmann

Al la estraro apartenas: Dr. Holtmann, Beckum, H. Klein, Ebsen, H. Schneider, Niedermarsberg, Richard Reuchlin, Mannheim, M. Schuhmacher, Köln-Weidenpesch, Dr. Woelk, Düren.

Provizora afergvidanto estas: Obering, Paul Hübner, Köln-Dellbrück, Berg-Gladbacher Str. 1095.

energia kunlaborado kaj atentigis pri la favora situacio politika, kiu ja nepre postulas la ĝeneralan enkondukon de neŭtrala helplingvo. Liaj trafikaj kaj simpatiaj vortoj vekis grandan eĥon. — Unua agado de la nova prezidanto estis starigi laŭ proponoj de la kongresanoj liston de novaj estraranoj, kiun la kongreso agnoskis. (Detalojn raportos la venonta numero de EP).

Sidante en la vagonaro, kiu veturigas min hejmen al Kolonjo, mi skribas ĉi tiujn liniojn por Esperanto-Post. Mankas la mencio de kelkaj aranĝoj, sed mi ne povis partopreni samtempe ĉe du diversaj lokoj. Ĉu la multaj anoncigitaj fak-kunsidoj laboris sukcese aŭ ne — ĉu Gepatra Sekcio, ĉu SAT, ĉu Katolika Sekcio, ĉu Eŭropa Unio, ĉu Instruistoj — tion mi ne scias. Certe aliaj legantoj de EP raportos pri tio.

Car la oficiala ekzamen-komisiono okazigis dum la Germana Kongreso en Frankfurt Esperanto-ekzamenojn, nia movado riĉiĝis je kelkaj aprobitaj samideanoj. Gratulon al la partoprenintoj!

Insulo en la maro de laboro kaj ekseitoj estis la amuzvespero en la ejo de „Bockenheimer Turngemeinde“. Tie oni efektive povis konstati, ke ankaŭ en Frankfurt la gesamideanoj scias ridi kaj sin amuzi. Rimarkinda estis la senhalta fluo de la diversaj treege humorplenaj kaj bonegaj prezentaĵoj. La bona preparo de la vespero estas aparte menciinda.

Pri la ekskurso mi bedaŭrinde ne povas raportii, ĉar partopreni ĝin mi ne trovis tempon. Laŭ mia scio ĝin ĝuis ĉento da kongresanoj.

Al la LKK mi — certe ankaŭ en la nomo de ĉiuj kongresanoj — kun vera plezuro dankas pro la farita laboro. Speciale pro la samtempa renkontiĝo de 300 000 (!) sudetgermanoŝ la preparaj laboroj estis eksterordinare malfacilaj. Konsiderante tiujn cirkonstancojn oni povas nur diri, ke LKK faris ĉion eblan!

Kien ni vojaĝos en la venonta jaro?  
Habe

### Esperanto im „Sudetenexpress“

Die vom Frankfurter Sudetentreffen heimkehrenden Heimatvertriebenen hörten durch die Rundfunkanlage des Luxussonderzuges einen Vortrag des samideano Gahler über den zur selben Zeit stattgefundenen Deutschen Esperanto-Kongreß in Frankfurt und über die Bedeutung des Esperanto für die Aufklärung des Auslandes. Er wies darauf hin, nicht zu vergessen, daß die sudetendeutschen Esperantisten schon immer die Vertreter für Volk und Heimat gewesen seien und daß das Sudetenland eine blühende Esperanto-Bewegung hatte, sowie, daß in Franzensbad das erste Esperanto-Denkmal der Welt schon vor dem ersten Weltkriege errichtet wurde. Er schloß mit der Bitte an seine Landsleute, der Esperanto-Sache ihre ganze Sympathie zu widmen und rief die sudetendeutsche Jugend auf, sich durch dieses ideale Verständigungsmittel Freunde in aller Welt zu suchen. Nach dem Vortrag wurde dieses Thema allgemein diskutiert. Im Zuge befanden sich rund 800 Sudetendeutsche, welche den Vortrag mit Wohlwollen aufnahmen.



La optimisto:  
Jen tuta paĝo de Esperanto-novaĵoj!  
La pesimisto:  
Sed ĉu ili alportos nian finan venkon?

# Esperanto en Jugoslavio

La okazonta Kongreso en Zagreb pravigas informi la legantaron de Esperanto-Post pri nia movado en Jugoslavio. La fajrero de l' Esperantismo ekflamis en tiu ĉi lando en du el la ĉefaj urboj. Beograd kaj Zagreb. Kiel unuan pioniron de nia ideo oni devas citi M. Avramović en jaro 1904, kiun sekvis en Beograd S. Budjevac kaj Dragomir Andonović, poste Radomir Klajić, la sola ankoraŭ vivanta. Aperis la unua lernolibro serba kompilita de J. Jovanović en Kragujevac (1908), la duan verkis R. Klajić. Fondigis la unua societo en Beograd (1909) kaj tre fervora D. Andonović redaktis kaj eldonis periodaĵon, „Serba Esperantisto“. Promesplena ekkomenco kruele haltigita pro la Balkana milito. Jam estis kelkaj lokoj kun Delegitoj de UEA (apenaŭ fondita). Unu el ĉi tiuj Delegitoj estis citita favore en raporto de la Komisiono de l' Internacia Ruĝa Kruco, ŝargita fari certajn konstatojn. Tiu ĉi Delegito - Teodoro St. Sopotskij en Kumanovo - sin prezentis al la Komisiono kaj per utilaj konsiloj meritis la dankon, esprimitan en la raporto.

En Kroatujo la unuaj pioniroj estis Mavro Spicer, Fran Kolar-Krom, P. Kastner, kaj la neforgesinda Danica Bedeković, verkinino de l' unua lernolibro en kroata lingvo (1909). Loka societo fondiĝis en Zagreb 1908 kaj jaron poste jam aperis revueto „Kroata Esperantisto“.

La unua slovena lernolibro aperis 1910 kaj unuaj pioniroj estis L. Koser kaj D. Herkov. En Sirmio kaj Slavonio du urboj gravuriĝis en la nesribita historio de Esperanto en Jugoslavio: Zemun (nun urboparto de Beograd), loko en kiu la fajrero de Esperanto neniam estingiĝis. En Osijek frue agadis tre fervora samideano kaj same fervora defendinto de la federigo de ĉiuj jugoslavioj: Mirko Kaniĉar, barbulo laŭ la tiama modo, kies leteroj — modeloj de kaligrafio — kaŭzis ĉiam sensacion ĉe liaj korespondantoj.

En la lando de la prunoj, nome en Bosnio aperis jam frue tre bela gvidlibro (Tra Bosnio-Hercegovino) dank' al la tiea pioniro, Jaromir Schwartz en Sarajevo, kiu multe penadis kaj sukcesis fondi societon „Stelo Bosnia“ (1910).

En Mostar vivis kaj agadis Niko Bubalo, instruinte, tradukinte kaj kompilinte detalan vortaron Kroata-Esperantan.

Jen la ĝermoj de nia movado en Jugoslavio, en kelkaj senpretendaj notoj. Tiu ĉi periodo entenas la jarojn 1904 ĝis 1912. La lando de la Nigra Montaro ankoraŭ ne aperis en niaj notoj.

Kiel frosto sur burĝonoj efikis la Balkana, sekvita du jarojn poste de la tutmonda milito. Ĝia fino markis la starigon de jugoslava ŝtato kaj kun ĝi la ekkomenco de jugoslava Esperanto-Movado. Venis novaj fortoj kaj la Jarlibro de UEA de 1921 indikis jam dek lokojn kun Delegitoj. Zagreb fariĝis centro dank' al klopodado sindona de D-ro Dušan Maruzzi. Fondigis Landa Asocio (Sudslava Esperanto-Ligo) kaj komencis aperi tre bone redaktita periodaĵo „Konkordo“ ĉe kiu kunlaboris kelkaj talentaj junuloj, Nikolao Hohlov, Ivo Rotkvić, Manojlović, Vojković kaj aliaj. La unua landa kongreso okazis en Zagreb en 1923 kaj la Universala okazanta estos kvazaŭ jubilea memorigo. Tiun ĉi belan ekmovon sekvis baldaŭ stagro, ŝuldata al diversaj cirkonstancoj. En 1929 la revuo „Konkordo“ ĉesis aperi.

Reprenis la torĉon kelkan tempon poste Beogradaj Esperantistoj sub gvido de D-ro Stefančić. En 1951 okazis ree kongreso en urbo Subotica kaj de tiam la Esperantomovado enradikiĝis. Aperis novaj fortoj kaj revuo „La Suda Stelo“ iĝis unu el la plej bonaj periodaĵoj esperantistaj. Impresiga estis la kongreso en Novi Sad (1958) kie brilis juna kaj dinamika samideano, oratoro entuziasmiganta amason: Ivo Lapenna. Dum tiu ĉi kongreso oni prave honoris la memoron de Marko Nešić, populara komponisto kaj poeto, Eksterordinara homo, delegito de UEA, dotita de modelaj seriozeco kaj precizeco. Nešić verkis kantojn por konatigi la lingvon al neesperantista publiko (du linioj en Esperanto, du linioj en nacia lingvo) aranĝita kun agrable sonanta melodio:

Mi trinkas ruĝan vinon  
kaj kisas belulinon...

La katastrofo de 1939 kaj pli poste la perforto al Jugoslavio ree metis finpunkton je promesplena evoluo. Sed kiel fenikso el cindro nia afero restariĝis kiel pruvas tion la bela revuo „Suda Stelo“ regule aperanta kaj la kuraĝa invito, okazigi la 58an Kongreson Universalan en Jugoslavio.

mandojn kaj temojn, fiksante ilian sinsekvon en la pritrakto.

En la tagordo aperos ekskluzive demandoj kaj temoj de ĉeestantaj personoj.

La publika kunveno okazos en la mateno de la 29-a de Julio 1953.

Ir. J. R. G. Isbrücker  
Prezidanto

## KELI-konferenco en 1955 en Rüdlingen (Sv.)

Post la UEA-kongreso en Zagreb la KELI-anaro konferencos en Svislando de la 4-a ĝis inkluzive la 10-a de Aŭgusto.

Temoj, diskutoj, ekskursoj, distraĵoj kpt. estos la programo de la konferenco.

La renkontiĝo okazos en Rüdlingen, urbeto inter Eglisau kaj Andelfingen en la bela norda regiono de Svislando, proksime de Schaffhausen.

La aranĝoj estas en la manoj de Svisaj KELI-anoj kaj por informoj oni sin turnu al: S-ro Fritz Liechti, Wallisellenstr. 429, Zürich 50, Svislando.

## Postkongreso en Nürnberg, Germanujo

Post la 36a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en München, la Esperanto-grupo Nürnberg aranĝis postkongreson, kiu estis vizitata de pli ol 100 personoj. La partoprenintoj el multaj landoj tre laŭdis tiun aranĝon. La trafikunuigo Nürnberg siatempe eldonis Esperanto-prospekton pri Nürnberg, laŭ kiu la esperantistoj povis bone konatigi kun la vidindaĵoj de la urbo. La trafikunuigo kaj la Esperanto-grupo Nürnberg invitas ĉiujn partoprenintojn de la 38a Universala Kongreso de Esperanto, Zagreb al Postkongreso en Nürnberg la 3an kaj 4an de Aŭgusto 1953. Aliĝojn oni sendu al Esperanto-grupo Nürnberg, Mögelder Hauptstr. 2, Telefono 58074.

La trafikunuigo Nürnberg eldonis novan bele ilustritan, plurlingvan prospekton kun Esperanto-teksto. Ĉiu kongresano de Zagreb ricevos tiun prospekton kun la kongres-dokumentoj. Personoj, kiuj intencas viziti Nürnbergon povas ricevi ĝin de Verkehrsverein Nürnberg e. V., Nürnberg, Lorenzstraße 31.

## Tutmonda ekspozicio de infan-desegnaĵoj

Dum la aŭtuno 1953 okazos en Stokholmo tutmonda ekspozicio de infan-desegnaĵoj. Aranĝanto estas Sveda Laborista Esperanto-Asocio en kunlaboro kun la granda, ĉiutaga gazeto Aftontidningen.

La moto de la desegnaĵoj estos: „Laboro kaj festo en mia hejmlandregiono.“

La desegnaĵoj povas esti koloraj aŭ blank-nigraj. Sur ĉiu desegnaĵo devas esti notita, en nacia lingvo kaj en Esperanto, la nomo de la lando kaj la titolo de la desegnaĵo. Krome estu notita la nomo kaj la aĝo de la desegninto.

Povas partopreni infanoj en aĝo ĝis 15 jaroj.

Ĉiu partoprenanto ricevos rekompencon.

Post la ekspoziciado en Stokholmo, ni provos cirkuligi la desegnaĵojn tra la tuta lando.

Estas tre grave el nia vidpunkto, ke tiu ekspozicio sukcesu, ĉar tiel ni havigos al nia organizo bonan reputacion. Ni nun petas kunhelpon de la esperantistoj en la tuta mondo; precipe ni turnas nin al la ĝeinstruistoj, kun peto pri absendo de desegnaĵoj, kiuj bone konformiĝas al la moto: „Laboro kaj festo en mia hejmlandregiono.“ Helpu nin montri al la redakcio de la kunlaboranta gazeto, al la legantoj kaj al la vizitintoj, ke la esperantistoj vere kapablas fari praktikan, interpopolan laboron.

Sveda Laborista Esperanto-Asocio  
Barnhusgatan 8, Stokholmo, Svedio

## Sveda Somera Semajno kunlaboras kun la sveda UNESKO- konsilantaro.

La sveda prelegserio venontsomere en Frostavallen, Höör, Svedujo, (9—16 aŭg.), ricevis bonajn apogantojn. Oni jam anoncis, ke la sveda ŝtato donas ekonomian subtenon por la temaro „Internacia kulturinterŝanĝo“, kaj lastatempe ne nur la Sveda Instituto por eksterlanda

(Vidu daŭrigon sur paĝo 71)

ĉeestantaj Akademianoj donos sian opinion.

2. Oni povas mem enkonduki iun temon pri la lingvo Esperanto en la kunveno kaj defendi ĝin.

En ambaŭ okazoj povos sekvi liberaj diskutoj laŭ la disponebla tempo. Ĉar tiu tempo estos limigita, la Akademio fiksos antaŭe la tagordon kaj elektos por tio la plej gravajn de-

# EVROPO VOKAS

ĈIUMONATA PAĜO POR LA EŬROPO-MOVADO ESPERANTISTA

Redaktanto: D-ro Jos. Holtmann, Beckum i. Westf., Hühlstr. 10

## Werbung für ein neutrales Hocheuropäisch in europäischen Kreisen

Meine Freunde!

Zur Vollendung der europäischen Einigung ist auch die Einführung einer im internationalen Verkehr allgemeinverbindlichen Sprache erforderlich. Frankreich und England möchten dabei, wie Versuche im Europarat zeigen, gern den anderen europäischen Partnern ihre Sprachen als internationales Bindeglied aufdrängen. Einem solchen undemokratischen Ansinnen stattzugeben, würde für die anderen europäischen Nationen binnen kurzem geistige Verkümmern und Absterben bedeuten; denn die Sprache ist kein mechanisches Werkzeug wie etwa eine Telefonanlage. Sie ist wesentlicher Bestandteil der Volksexistenz. Ohne nationale Sprache gibt es kein Volkstum, das eine Synthese von Sprache, Geist und Kultur darstellt. Wer seine eigene Volkssprache einem anderen Volkstum aufdrängt, zerstört unaufhaltsam dessen völkisches Eigenleben. Die europäischen Völker wollen aber gerade durch ihre politische Gemeinschaft ihre Eigenart bewahren und erhalten. Darum darf man keine nationale Sprache zum internationalen Verständigungsmittel in Europa machen, wenn man sich am eigenen Volkstum nicht aufs schwerste versündigen will. Nur ein neutrales — keinem Volke zugehöriges — Idiom kann daher als europäische Mittler- und Brudersprache in Frage kommen.

Darum eröffnet die gegenwärtige Lage Europas für Esperanto als eine Art Hocheuropäisch die größten Chancen, wenn man sie zu nutzen versteht. Die Werbung für Esperanto in den Kreisen der europäischen Politiker ist also eine ganz vordringliche Aufgabe. Dies kann wirkungsvoll nur durch Aufklärung über die in Esperanto liegenden Möglichkeiten, die europäische Sprachenfrage befriedigend zu lösen, geschehen. Eine schnelle Lösung erweist sich als notwendig, sowohl in der Armee als auch in der kommenden politischen Organisation Europas. Deshalb muß sich die Werbung für Esperanto als europäische Hochsprache an die dort entscheidenden Politiker richten. Ich habe einen bescheidenen Versuch gemacht, dessen Ergebnis ermutigend ist.

Ich versandte im Laufe der letzten drei Monate auf meine eigenen Kosten an Parlamentarier, Minister, Ministerpräsidenten usw. zwei Broschüren, die mir geeignet erschienen, nämlich

### „Die europäische Verteidigungsgemeinschaft und das Sprachenproblem“

geschrieben von dem Esperantisten-Dolmetscherhauptmann Agourtine in der französischen Armee (etwa 50 Exemplare)

### „Das Sprachenproblem in der europäischen Verfassung“

geschrieben von mir selbst (etwa 75 Exemplare).

Wie zu erwarten, antwortete nur ein kleiner Teil der angeschriebenen Personen, doch war keine ablehnende Antwort darunter. Im Gegenteil!

Auf Agourtines Broschüre antwortete das Amt des Bundespräsidenten Dr. Heuss in seinem Namen und teilte mit, daß er angeordnet habe, die Broschüre an das Ministerium Blank zu senden. Daß sie die Broschüre mit Interesse gelesen hätten, bestätigten die Ministerpräsidenten von Niedersachsen, Rheinland-Westfalen und des Südweststaates, außerdem die Parlamentarier Dr. Mende, Mellies und Euler. Der **Abgeordnete Strauss** schreibt:

„... daß die Frage der Verwendung einer Hilfssprache für die Europa-Armee noch eingehend im Ausschuss für Fragen der europäischen Sicherheit be-

handelt werden wird, wobei auch Ihre Vorschläge zur Diskussion gestellt werden sollen.“

Auf meine eigene Broschüre erhielt ich Antworten, die ich auszugsweise wiedergebe:

#### Bundeskanzleramt:

„Ich habe die Eingabe an das Auswärtige Amt weitergeleitet und nehme an, daß sich die dortige Kulturabteilung mit Ihren Gedankengängen näher befassen wird.“

#### Bundesminister Kaiser:

„Zweifellos wird dem europäischen Gedanken durch Überbrückung der bestehenden Sprachenschwierigkeiten wesentliche Förderung zuteil werden, und ich bin gewiß, daß auf dem von Ihnen aufgezeigten Wege fruchtbare Ergebnisse zu erzielen sind.“

#### Abgeordneter Dr. Merkatz:

„Ich werde mich mit Ihren Anregungen eingehend beschäftigen. Ob die Sprachenfrage durch Einführung einer Kunstsprache in der europäischen Gemeinschaft gelöst werden kann, vermag ich im Augenblick noch nicht zu beurteilen. Ich möchte mir eine Stellungnahme vorbehalten, nachdem ich Ihre Anregungen einer genauen Durchsicht unterzogen habe.“

#### Abgeordneter Dr. Kopf:

„Die Organe der künftigen europäischen Gemeinschaft werden sich zweifellos zu gegebener Zeit mit einer vernunftgemäßen Regelung der Sprachenfrage befassen müssen, und es erscheint mir daher sehr wertvoll, daß Sie Ihre Gesichtspunkte und Gedankengänge in Ihrem sehr beachtenswerten Aufsatz niedergelegt haben.“

#### Rechtsanwalt van Kauenbergh, Luxemburg, Mitglied der ad-hoc-Versammlung:

„Ich habe mit Interesse Ihr Schreiben erhalten. ... Es wäre zu begrüßen, wenn im Zuge der Europa-Integration auch das Sprachenproblem eine Lösung fände.“

#### Ministerpräsident Dr. Drees, Den Haag, Holland:

„... wenn man Esperanto als gemeinsame internationale Hilfssprache annähme, würde dies viel zur internationalen Zusammenarbeit beitragen.“

#### Abgeordneter Dr. Mommer:

„Ich bin bereit, mich für eine ernste Prüfung Ihrer Ideen einzusetzen.“

#### Sekretariat der CDU/CSU-Fraktion des Bundestages:

„Die Frage einer gemeinsamen Verhandlungssprache ist ein selbstverständliches Anliegen für den Zeitpunkt, in dem die europäische Vereinigung wirklich wird.“

#### Dr. v. Brentano an Dekan Bergweiler, der in gleichem Sinne geschrieben hatte:

„Die Bedenken, die der Wahl einer bestimmten Nationalsprache entgegenstehen, verstehe ich sehr wohl und will auch bei nächster Gelegenheit mit meinen Freunden und Kollegen im Europäischen Verfassungsausschuss diese Frage einmal diskutieren.“

Angesichts einer solchen Aufnahmebereitschaft für unsere Ideen muß mit allen Mitteln dafür gesorgt werden, daß der Deutsche Esperanto-Bund mit Unterstützung anderer nationaler Esperanto-Verbände die europäische Propaganda in großem Stile durchführt.

Dr. Herrmann

"Mi tre ĝojas, ke vi fine venas. Bonan vesperon al vi! Kiel vi fartas?"

"Bonan vesperon ankaŭ al vi. Mi same ĝojas, ke fine mi trovis liberan vesperon por viziti vin. Kiel vi fartas? Mi esperas, bone."

"Ho! Dankon! Mi estas kontenta, vere kontenta. Mi eĉ ne suferis gripo malgraŭ ke ĉiuj ĉirkaŭ mi estis malsanaj."

"Pri tio mi multe ĝojas. Multan laboron mi faris dum la unuaj monatoj de ĉi tiu jaro. Kiel mi jam diris: Nenian vesperon mi estis libera. Mia edzino ofte grumbliis."

"Mi kredas tion. Ĉu vi povas rakonti al mi novajn interesajn el la Esperanto-Movado? Io grava ja okazis: La Rezolucio de UNESKO pri Esperanto. Tio estas tre ĝojiga kaj vera sukceso."

"Nu, nu! Sukceso tio estas, jes. Sed ĉu ni povas eluzi ĉi tiun sukceson? Ĉu la granda publiko aŭdis ion pri ĉi tiu fakto? Ĉu ĝi, la granda publiko, komprenas pri kio temas? Oni eĉ ne povis konvene publikigi tion, tiel ke ĉiu sciigu pri la fakto, ke UNESKO pri-traktos dum la venonta jarkunveno en Montevideo la problemon de nia lingvo uzota dum la estontaj kunvenoj kaj intertraktoj de tiu universala instanco."

"Jes, vi pravas. En Radio mi nenion aŭdis pri ĝi, ankaŭ en la gazetaro mi legis eĉ ne unu vorton. Kaj kio nun devus okazi?"

"Nu, ni devas atendi, kion decidos la jarkunveno de UNESKO. Fakte ni povas fari nenion alian. Sed dum dek monatoj ni devus pruvi al UNESKO, ke Esperanto vere valoras tian pritaktadon dum la jarkunveno. Ni devus pruvi, ke Esperanto estas parolata de multaj miloj da homoj, ke oni praktike jam uzas ĝin en internaciaj rilatoj, ke multaj homoj havas plej bonajn kontaktojn per ĝi, ke eĉ multaj registaroj sukcese uzis kaj uzas ĝin kiel konferencan lingvon kaj tiel plu!"

"Sed tion ni ja ne povas fari!"

"Jen jam estas gravega situacio! Nun ni devas havi altsumajn monrimedojn por propagandi en ĉiuj sferoj, por ke la UNESKO-anoj konvinkigu pri la praveco de la propono farita kaj ke ili konsekvence devos decidi."

"Ne, tion ni ne povas. Kaj kion ni faru?"

"Fakte ni devas atendi, kion oni decidos en Montevideo. Tamen mi estas konvinkita, ke la estro de la „Centro de Esploroj kaj Dokumentado“, Prof. Dr. Lapenna, kiu batalis — vere batalis — en Parizo pro la akiro de la Rezolucio, ankaŭ por Montevideo ĉion preparos kaj certe kunportos ĉian materialon por pruvi la valoron de nia Esperanto."

"Ĉu la profesoro sukcesos?"

"Tion mi ne scias. Se mi objektive juĝu, mi kredas, ke nia afero en ĉi tiu decida momento ne sufiĉe impresos la konferencanojn kaj mal-

graŭ niaj deziroj decidos malfavore."

"Kaj poste?"

"Ni devos daŭrigi nian ĝisnunan metodon de laboro por Esperanto kaj ni devos atendi ĝis venos nova favora tempo por ni."

"Sed nun estas la granda bonŝanco por ni."

"Kompreneble! Sed anstataŭ ke ni ĉiuj kunhelpu por atingi nian celon — ni disfalas pli kaj pli. Ne nur en Germanujo, sed ankaŭ en aliaj grandaj landoj. Pri la kialoj mi parolos post konvena tempo. Por hodiaŭ nur tiom: Perdiĝis la spirito de Zamenhof! Ni ree devas zorgi, ke niaj samideanoj denove plene konatiĝu kun tiu nepre necesa fundamento."

"Jes, vi pravas. Sed kiel ni venku

## ĈU NIA MOVADO STAGNAS?

Dialogo de Maks Federl

**Kvankam niaj estimataj gelegantoj ŝajne ne tre ŝatas ĉi tiun temon, ni daŭrigas jen la artikolon. La paŭzo okazis pro granda aro da kunlaboraĵoj kaj pro troa okupo dumvintra de la verkinto.**

**Rigardu jarkolekton 1952 paĝoj 75, 103, 115 kaj 139.**

la nunan situacion? Ĉu ni ĝenerale povas fari ion?"

"Praktike ni povas fari nenion kaj sole devas atendi, kion entreprenas UEA, pli precize dirite: La Centro de Esplorado kaj Dokumentado."

"Restas al ni nia ĝisnuna laboro."

"Jes, sed ne nur! Ni devas fari multon, se ni povus disponi pri sufiĉe da mono. Ni devus propagandi per ĉiuj rimedoj. Speciale ni devus zorgi, ke kiel eble plej multaj samideanoj uzu Esperanton praktike per internaciaj vojaĝoj, konferencoj kaj kongresoj."

"Mi komprenas, sed la tempo estas tro mallonga por tia grandmezura entrepreno."

"Jes, pasis tro longa tempo de neaktiveco. Kaj nun devas helpi ĉiuj. Ni bezonas direktantan centron. Sed ĝis nun mi aŭdis aŭ legis nenion el Londono."

"Ankaŭ mi ne. Ĉu vi plu meditis pri viaj propagandmetodoj uzendaj dum la venonta tempo?"

"Jes. Sed la realigo estas treege malfacila. Tamen mi pensis pri tiuj filmoj, kiujn ni bezonas por nia propagando en urboj kaj vilaĝoj."

"Kaj kion vi elpensis?"

"Nu, tiuj filmoj devus okulfrappe montri, kiajn avantaĝojn havas la uzo de Esperanto. Unu el tiuj filmoj montru du sinjorojn sin preparantajn por vojaĝo al eksterlando. Unu scias Esperanton, la alia ne scipovas ĝin, sed lernis en lernejo antaŭ multaj jaroj — ni diru — la francan lingvon. Ili alvenas en Parizo. La esperantiston atendas samideanoj, kiuj amike akceptas

lin kaj per informoj kaj gvidado ĉiamaniere subtenas lin. Kun bonaj rezultoj li veturas returne. — La alia sinjoro travivas multajn aventurojn ne ĉiam agrablajn pro la multaj miskomprenoj kaj eraroj kaj ne sukcese plenumas la negocajn komisionojn. Lerta filmreĝisoro certe povos enigi tiajn poentojn, ke la facila venko de malfacilaĵoj per Esperanto estu forte akcentita, kaj klare rimarkante tion, la rigardantoj estu instigitaj lerni Esperanton."

"Tio certe estus grava subteno de nia laboro por Esperanto."

"Oni kompreneble povas eltrovi multajn aliajn temojn frappe montrantaj la plifaciligon de la internacia vivo per Esperanto. Precipe nun, kiam ni preparas nin al unuigo de la eŭropaj ŝtatoj. Kiom da markoj oni ŝparos pro forfalo de granda nombro da interpretistoj? Kaj la tutaj teknikaj instalaĵoj por telefona interpretado estus ŝparataj. Krome ĉiuj komprenas bonege unu la alian, kaj fuŝtradukoj ne plu okazos."

"Vere bonegan estontecon vi pentras antaŭ mia spirita okulo — sed de kie ni prenu la instruistojn por tiel rapide instrui Esperanton al ĉiuj diversaciaj parlamentanoj kaj politikistoj?"

"Tio nature estas kvankam grandega sed solvebla tasko. En ĉiu eŭropa lando jam ekzistas niaj lernolibroj. Certe oni povos liberigi tiom da instrukapablaj homoj, kiuj unue instruos la ĉefajn politikistojn kaj parlamentanojn. Post unu jaro ĉiujn intertraktojn oni povos fari en Esperanto. La koncernaj homoj ĉiuj estas tiel instruitaj, ke la lernado de Esperanto ne estos tro malfacila por ili."

"Estus por mi plej granda ĝojo, se tion mi ankoraŭ ĝisvivus."

"Ankaŭ por mi. Sed nun ni kune laboru, por ke ni akiru pli da adeptoj por nia lingvo kaj ni nuntempaj esperantistoj denove fleĝu la spiriton de Zamenhof, kiu predikis amon kaj amikecon inter ĉiuj homoj sen diferenco de nacio, religio kaj rango."


"Nun, kion mi povos fari laŭ ĉi tiu direkto, mi faros."

"Se ĉiuj samideanoj pensus same kiel vi — tiam mi ne timas pri la estonteco de Esperanto. Ĉiuj aliĝu al grupoj kaj asocioj por ke mono fluu en la kasojn. Ĉiuj samideanoj abonu Esperanto-Revuojn kaj-Gazetojn, ili aĉetu librojn ankaŭ literaturajn kaj ili lernu, lernu, lernu! Nur parolantaj esperantistoj montras al la publiko, ke Esperanto estas taŭga lingvo por ĉiuj medioj."

"Mi kunhelpas, helpis kaj helpos."

"Tre bone! Sed nun mi devas adiaŭi. Ne tro multe pensu pri nia hodiaŭa konversacio, por ke vi kviete dormu. Bonan nokton!"

"Bonan nokton ankaŭ al vi! Kaj ĝis revido!"



# Trifoje akurate je la dekdua horo...

*Romano de Walter Galders*

EL LA GERMANA TRADUKIS FRIEDRICH ELLERSIEK

Kvara daŭrigo

„Sinjoroj“, li diris, „en nia hodiaŭa kunveno ni devas prilabori eksterordinare ampleksan materialon. Kiel unua punkto staras sur la tagordo ĉi tiu objekto.“ Per la mano li montris al granda oleopentraĵo, belega mediteranea pejzaĝo. „Vi ĉiuj certe konas la bildon, kaj mi do ne bezonas nomi la pentriston. La ĝisnuna posedinto nur malfacile decidiĝis, fordoni la bildon.“ La juna viro ridetis ironie, kaj unu el la korpulentaj sinjoroj gorĝ-ridis kiel junulino. „La bildo estas vendota prefere en eksterlando“, pluparolis la juna viro, „ĉar mi timas, ke en Francujo mankas kompreno ĝuste por ĉi tiu verko.“ La dika sinjoro denove gorĝ-ridis. „Mi opinias, ke ni nepre estas laŭtempe modestaj, se ni fiksaĵ tridek mil Frankojn kiel minimuman proponon.“

Indigna murmurado estiĝis inter la dikaj maljunetaj sinjoroj kaj elvokis respondan grumblon de la graciuloj.

„Kiu proponas pli ol tridek mil Frankojn?“ la prezidanto demandis nekonfuzite. — „Tridek kvin mil, sed tio estas mia ruiniĝo!“ kriis la fakulo, kiu antaŭe alparolis Nombriilon. — „Kvardek mil! Mia maksimuma propono!“ kriis alia. — „Kvardek kvin mil!“ eksonis voĉo el angulo. Por kvindek mil Frankoj la bildo fine estis fordonata. Laŭtiĝis ekscitaj krioj: „Trompo!“ „Uzuro!“ „Prezo-malboniganto!“ „Batu lin!“

La prezidanto energie frapis per sia orumita batingo sur la tablon. „Mi petas silenton, alie mi igas evakui la ĉambron! Cetere ĉiu trovos ion konvenan.“ Li mansignis al marmora busto. „La dua punkto de nia tagordo venis rekte el Romo. La grafo Cavalcabue nur treege malvolonte lasis ĝin al nia Roma kolego, al kiu li faris la plej grandajn malfacilaĵojn.“ La dika sinjoro, kiu ĉi tiun fojon ridis, blekis kiel virkapro. — „Dek mil Frankojn! — Kiu proponas plion?“

Nombriil por kelkaj minutoj estis foririnta el la ĉambro kaj ĝuste revenis, kiam ĉi tiu demando estis farata. „Mi!“ li kriegis kaj eltiris pistolon. „Mi!“ kriis ankaŭ Neufeld, eksaltis kaj ankaŭ tiris pafilon el la poŝo. En la sama momento la pordo de el la koridoro estis puŝe malfermata, kaj la kvin helpdetektivoj, kies manoj ankaŭ ne estis malplenaj, rapide eniris la ĉambron.

„Helpon! Rabistoj! Murdistoj!“ ĥaose plorkriis la ekspertaj maljunetaj sinjoroj, dum la gracilaj sportuloj ekkaptis la plej proksimajn pezajn objektojn por armi sin. „Murdistoj!“ kriaciis la sinjoro, kiu antaŭe kaprobleke ridis, kaj penis rampi sub la sofona.

„Ĉu rabistoj? Ĉu murdistoj?“ Nombriil diris kaj montris sian polican legitimajon. „Povas esti, ke tiaj profesioj estas reprezentataj ĉi tie, sed ne per ni. Manojn alten, aŭ mi pafos!“ li alkriegis junulon, kiu en suspektinda maniero metis manon en la postan pantalonpoŝon. „Sinjoroj, bedaŭrinde vi ne povos plenumi vian tagordon hodiaŭ. Mi devas peti vin, sekvi nin sen kontraŭstaro al la polic-prefektejo.“

„Kial oni arestas nin? Kion ni krimis? Oni ignoregas la homrajtojn!“ kriegis dikventraĉa sinjoro kun ruĝega vizaĝo. „Mi povas legitimi min, mi ne estas krimulo, mi estas la artaj-vendisto Violette el la Rue de Rivoli...“

„Silentu, karulo“, diris Nombriil. „Rabmurdisto vi verŝajne ne estas, sed vi ne malŝatas malgrandan, profitan ŝtelkaŝon. Ankaŭ tio jam sufiĉas por akuzo. Venu, sinjoroj!“

Kvina ĉapitro

*Kaj denove je la tagmeza horo*

La Gotthard-ekspres-vagonaro Berlin—Milano ekhaltis en la stacio Göschenen, por iom ripozi, antaŭ ol ĝi veturos en la tunelon. Estis mallonge antaŭ la dekdua tagmeze. Pasaĝeroj, kiuj estis ŝparemaj aŭ pro alia kaŭzo ne emis manĝi en la restoraci-vagono, eliris la trajnon kaj kvietigis sian malsaton per varmaj kolbasetoj. Aliaj promenigis sur la perono tien kaj reen por movi siajn gambojn.

„Hu, mi timas pro la longa tunelo!“ diris juna sinjorino, skuante sin. „Kiel facile povas okazi akcidento en ĝi. La tunelo ja povas ruiniĝi. Kiom alta estas la monto super la tunelo, sinjoro doktoro?“ — „Proksimume mil metrojn, fraŭlina moŝto. Sed kial la tunelo ruiniĝu? Kaj eĉ se tio nepre okazu, kial do ĝuste dum la dekkvar minutoj, kiujn ni bezonas por la traveturo? Pli ol kvindek jarojn la tunelo jam eltenis en firmeco — kial ĝi ne daŭrigu tion almenaŭ duonan horon pli longe?“

„Envere vi ja estas prava; tamen estas timige. La vagonaro povos malfunkcii meze en la tunelo. Kio estos tiukaze? Tiam ni sidos kaptitaj meze en Gotthard aŭ eble devos elmarŝi piede, kio jam unufoje okazis al mi sur la subtera fervojo en Berlino.“

„Ĉu ne pli? Tio vere ne estas grava. Ni supozu, ke la trajno devus halti meze en la tunelo. Tiukaze ni povus piediri al Airolo, kiun ni atingos post apenaŭ du horoj. Cetere, Airolo laŭdire estas tre bela. Certe estus profite, resti tie kelkajn horojn. Kuraĝiĝu! Kaj se la trajno malfunkcios en la tunelo, ni, sinjoro Schönfeld kaj mi, elportos vin sur niaj manoj. Konsidere al via gracileco, vi estus malpeza ŝarĝo por ni!“

„Envagoniĝu!“ kriis la konduktoroj. La vagonpordoj klakfermiĝis, kaj la staciestro donis la signalon por forveturo. La du elektraj mamutoj ektiris, kaj la vagonaro tondre enveturis la tunelon. Tre baldaŭ estis atingita la dumhora rapideco de sepdek kilometroj, kiun vera Gotthard-lokomotivo ne ŝatas malsuperi. Oni rapide fermis la fenestrojn, ĉar trablovis kaj ankaŭ odoris laŭ kelo. La timema fraŭlino estis preminta sin en angulon kaj klopodis, dormante pasigi la ekscitan tunel-traveturon. Sed de momento al momento ŝi ektimigite eklevetis sin kaj demandis: „Ĉu ni baldaŭ estos ĉe la fino?“ — „Post dek minutoj“, respondis maljuneta sinjoro kun

grandaj okulvitroj, rigardante sian horloĝon. — „Terure! Mi kredas, ke la tunelo plilongiĝas, nur por ke la traveturo estu kiel eble plej malagraba al mi.“

„Sep minutojn; nun ni estas en la mezo“, murmuris la sinjoro kun la grandaj okulvitroj kaj remetis sian horloĝon en la vestopoŝon.

Jen subite okazis terura ekskuego. La bremsoj funkciis-tiel fortege, ke la radoj furioze kriegis kaj disjetis fajrerojn. Samtempe estingiĝis ĉiuj lumoj en la vagonaro. Ĉi tiu glitis plu kelkajn sekundojn sur la reloj antaŭen kaj poste haltis.

En multaj kupeoj pakajoj estis falintaj el la super-seĝaj retoj. La trafitoj pro doloro laŭte ekkriis, la aliaj pro teruro kunkriis. Pluraj sinjorinoj eksvenis. La fraŭlino kun la tuneltimo estis ĵetinta sin laŭlonge sur la sidbenkon kaj lamentis: „Mi jam havis la ĝustan antaŭsenton! Se mi nur estus restinta en Göschenen! Nun mi sidas ĉi tie meze en monto kaj eble neniam revidos la taglumon!“

„Sed trankviliĝu do, fraŭlina moŝto“, admonis la sinjoro kun la grandaj okulvitroj, „vi ja ne estas lezita, ĉu ne? Nu do, tiukaze vi ne havas kaŭzon por krii tiel laŭte. La afero eble estas tute sendanĝera. Eble riparlaboroj en la tunelo.“

En la senlumaj koridoroj de la vagonoj la pasaĝeroj ekscitite kaj haose kuris tien kaj reen, interpuŝis sin kaj falis super ĉirkaŭstarantaj kofroj. En diversaj lingvoj oni ĝemis, kriis, insultis kaj demandis.

Konduktoro kun manlanterno iris tra la koridoroj. La brava svisa federaciato preterirante ĵetis en ĉiun kupeon kelkajn trankviligajn vortojn: „Estu trankvilaj, gesinjoroj. Ne ekzistas danĝero. Ni certe elvenos el la tunelo.“

„Kio do okazis?“ atake demandis lin ĉiuj. Nu, tion ankaŭ li mem ankoraŭ ne sciis, ĉar li venis el la fino de l' vagonaro. „Verŝajne fuŝ-cirkuito“, li diris, „tio estas rapide riparebla. Mi tuj volas iri antaŭen kaj informi min.“

Post kelkaj minutoj li revenis. Se lia lampo estus luminta pli hele, la pasaĝeroj estus vidintaj, kiel pale li aspektis. Li gratis sian kapon kaj diris: „Ja, gesinjoroj, mi ne bone komprenas la aferon. Ambaŭ lokomotivostroj estas malaperintaj, la maŝino estas malfunkciigitaj per la aŭtomata malkonektilo. Kial? Mi tute ne scias! La signalo montras liberan vojon.“

„Do rabistoj!“ sinjorino ekkriis terurigite kaj premis sian mansaketon al si. „Krimulaĵo en la Gotthard-tunelo“, amerika ĵurnalisto diris kontentege kaj komencis, en la lumbrilo de la kondukatora lampo skribi sur sia vojaĝ-skribmaŝino. „Kiel vi nomiĝas, kara sinjoro?“ li turnis sin demandante al la konduktoro, „kaj el kiu vilaĝo vi estas?“ — „Tio neniel interesu vin!“ la oficisto respondis malafable kaj estigis inter la pasaĝeroj indignegon kontraŭ la Amerikano. „Kiu scias, ĉu li ne estas kunulo de la rabistoj!“ kriis akrega virinvoĉo. „Transe en Ameriko tio ja estas ĉiutagaĵo!“

„Kaj kion vi intencas fari, por eligi nin el ĉi tiu talpejo?“ sinjoro demandis kaj energie kaptis la konduktoron je la ŝultro. — „Mi jam telefonis al Göschenen kaj Airolo kaj mendis helpovagonaron. Ion plian mi por la nuna momento ne povas fari.“

„Kaj intertempe eble ruiniĝos la tunelo!“ veplendis juna edzino. „Kial vi do ne volis veturi per la poŝt-aŭto trans la Gotthard-on?“ ŝi riproĉe demandis sian edzon.

Itala pasaĝero dume komencis zorgi pri lumumado. Li oferis du skatolojn de la fame konataj vaks-alumetoj, de kiuj li feliĉe havis speciale grandan formaton. Li ekbruligis kaj fiksis ilin sur la fenestro-kadroj en la koridoro. Tio instigis ankaŭ la oferemon de dense vualita sinjorino. Ŝi volis veturi al Locarno por oferi al la tiea Madonna del Sasso kelkajn kandelojn. Du el ili ŝi nun oferis.

(Daŭrigota)



## Zwei Zamenhof-Karten

auf gutem Kunstdruckkarton mit schreibfähiger Rückseite gedruckt

Preis: 1 Stück 0,20 DM  
10 Stück 1,80 DM  
50 Stück 7,50 DM  
100 Stück 10,- DM

Bitte 10% für Porto und Verpackung

Esperanto-Abteilung  
der Limburger  
Vereinsdruckerei GmbH.  
Limburg/Lahn

**Jetzt kommen Kongresse!**  
**Jetzt kommen Auslandsreisen!**  
**Jetzt kommen Ferienlager!**

Sein gutes Esperanto, seine geschickte Auswahl der oft gesuchten Wörter, Ausdrücke und Sätze sind bekannt!

Zur stiefelnden Unterhaltung über alle Themen des täglichen Lebens hilft Ihnen unser Sprachfabrik

Preis 1,60 DM zuzüglich 10% für Porto und Verpackung!

**Esperanto in der Tasche!**

**Wie  
Bereite  
ich mich  
auf  
Esperanto-  
Prüfungen  
usw.?**



Antwort ganz einfach:

**Indem ich POST LA KURSO  
von W. und H. Wingen durcharbeite!  
Bilden Sie „studrondojn“!**

Preis 3,60 DM, zuzüglich 10% für Porto und Verpackung. Ein Schlüssel dazu erscheint in Kürze. Preis 1,20 DM.

**Ĉu vi jam varbis tri novajn jarabonantojn?**

Vi ja scias: Por tri novaj vi ricevos dum tuta jaro senkoston abonon!



## Esperanto kaj la Studentaro

Oni povus opinii, ke artikolo sub tiu titolo apartenas al la multeco de verkajtoj surskribataj „Esperanto kaj la Falkoj“, „Esperanto kaj la Fervojista Junularo“, „Esperanto kaj la Kristana Junularo“ kaj similaj. Sed tio nur laŭteme ĝustas. Laŭ la signifo la studentaro superas ĉiujn tiujn grupojn de gejunuloj kaj ĝi do devas esti speciale priatentata flanke de la esperantistaro.

Mi per tio ne volas preferi la studentaron pro malestimo al la laborista junularo aŭ pro tio ke mi mem estas studento. Mi nur tro bone scias, kiom ege la malmultaj inter ni studentoj kiuj, portantaj multkolorajn rubandojn kaj ĉapojn, bierdrinkas kaj skermadas, senkreditigas la tutan studentaron en la okuloj de la popolamasoj, kiom ili aĉigas la ardan kaj zorgoplenan studon de la granda plejmulto de la gestudentoj kaj la lojalan volon de alia parto, en kunlaborado kun la amasoj de nia popolo: krei homan asocion pli feliĉan.

Sed objektivite rigardate, el la gestudentoj multe pli granda procentaĵo poste okupos gravajn kaj decidajn postenojn ol el aliaj grupoj de la junularo. Ne malestimenda estas la granda influo de la pastroj, speciale de la katolikaj, sur la kamparo, kaj ĉiuj pastroj devas antaŭe esti studentoj. Ankaŭ ĉiuj kuracistoj kaj natursciencaj esploristoj de morgaŭ hodiaŭ estas studentoj. Ankaŭ pli grava en la publika vivo estos la influo de la estontaj juĝistoj, kiuj same kiel la estontaj advokatoj kaj altaj juristaj oficistoj nun ankaŭ studas. Minime same influhavaj estos la instruistoj de la gimnazioj kaj de la bazaj lernejoj, hodiaŭ ĉiuj gestudentoj: kiel ili poste edukos niajn infanojn, tio decidus en alta grado pri la mondo de postmorgaŭ. Ĉiuj inĝenieroj, kiuj per sia laboro antaŭenpuŝos la teknikan evoluon kaj ebligos per tio pli agrablan vivon, devas antaŭe studi. Kaj el la gestudentoj de la ekonomia fakultato poste rekrutiĝos la ĉefoj de la grandaj uzinoj kaj fabrikoj kaj la ekonomiaj teoretikuloj, kies pensoj — kiel tiuj de Karl Marx — povas influu la iradon de la historio, kaj ankaŭ multaj el ili okupos la influhavajn postenojn en la oficejoj.

Ankaŭ la profesoroj de la estonteco hodiaŭ estas nur studentoj. Ili edukos la gestudentojn de la posta generacio. Nin speciale interesas la lingvistikistoj inter ili. Car nur nerealismaj idealistoj povas ankaŭ esperi, ke la amaso de la esperantistaj elektantoj devigos la parlamentanojn leĝe akcepti Esperanton, la dua vojo de la fina enkonduko, tiu de supre, iam estos la irota vojo. Tio signifas, ke de iu flanko la unuopaj registaroj estos invitataj aprobi internacian leĝon pri la enkonduko. Antaŭ tiu aprobo la registaroj havigos al si la neeviteblan

ekspertizon, kaj la ekspertoj, kiuj konsilos la registarojn, ne nur estos ni esperantistoj, sed ĉefe la lingvistikaj profesoroj. Kompreneble ĉiu registaro povas sendepende de iu ekspertizo fari favoran decidon al Esperanto, sed ekspertizo subtenanta niajn postulojn certe grave antaŭenhelpos.

Se la nunaj gestudentoj poste havos gravajn postenojn, ili ne plu estos facile alparoleblaj de ni esperantistoj. Dum ili kiel lernantoj estis forte influataj kontraŭ Esperanto de siaj instruistoj, en la profesia vivo ilia opinio jam estos rigidiĝanta. Nur dum la studtempo ili — minimume parte — estas iom aŭskultemaj, se ni diras al ili niajn argumentojn, ĉar la diritaĵoj de la instruistoj dum tiu tempo ne plu tiel akre estas absolutaj veraĵoj.

La plej konvena tempo por agado niaflanka do estas la studtempo, kaj la agadejoj estas la universitatoj kaj altlernejoj. Sed la nesufiĉa scienca reputacio de la problemo de internacia neŭtrala lingvo estas forta barilo kontraŭ esperantista aktiveco inter la studentaro. ISAE en tiu rilato jam faris bonan kaj valoregan laboron, sed ĝi estas scienca kaj ne scienca-politika organizaĵo, kiu estas bezonata por tiuj aferoj. Fakte estas, ke Esperanto ankoraŭ multloke ne jam estas agnoskata kiel scienca objekto, kaj anstataŭ pro iuj longe pripensitaj kialoj kontraŭ la interlingvon (aŭ eble ankaŭ subteno ĝin) la amaso de la profesoroj kaj studentoj nur priridas ĝin kaj nin. Devas do esti nia unua klopodo, nun ankaŭ aktiviĝi sur la scienca kampo kaj ekigi la diskuton inter la ekspertoj kaj fakuloj pri lingvistiko kaj pri la aliaj sciencoj, kiujn influas la enkonduko de Esperanto, ekz. la sociologio, sur scienca nivelo.

Ke tio ne nur estas opinio de mi sed ŝajne konvena al tiu tempo de la interlingvistika evoluo, montras la fondiĝo de du organizaĵoj, kiuj havas speciale tiun celon. Estas sur internacia laborkampo la Centro por Esploroj kaj Dokumentado sub gvidado de prof. D-ro I. Lapenna en London, kiu kunligas ĉiujn sciencistojn esperantistajn por intertraktaĵoj kun samranguloj neesperantistaj. Estas ekzemple merito de prof. d-ro Lapenna kaj de la UEA-komisiito, s-ro Durrant, esti eltombigintaj la UN-peticion kaj devigintaj la kulturalan asocion de UN, la UNESCO-n nun okupiĝi pri tiu temo. Sen la aktiveco de tiuj personoj kaj de la organizaĵo malantaŭ ili certe la UN estus lasintaj la nedeziran peticion en la forgeso, kie ĝi jam troviĝis de du kaj duona jaroj.

La kunlaboradon en la scienca atako kontraŭ nescio pri Esperanto faras en Germanio la Societo por Internacia Lingvo, gvidata de samideano D-ro Bormann. Ĝia celo estas ekigi per la aperigo de sciencaj broŝuroj la diskuton pri la problemo de

internacia lingvo neŭtrala inter la germana sciencistaro.

Jam la fakto, ke du tiaj organizaĵoj stariĝis dum la lasta tempo, povas doni al ni la esperon, ke la debato pri Esperanto inter la decidaj personoj ree ekestos kaj ke dum tiu debato troviĝos krom akraj kontraŭuloj ankaŭ novaj amikoj de neŭtrala interlingvo inter la profesoroj. Kaj afero, kiu pripensigas la profesorojn ankaŭ estas afero inda al la klopodoj de la studentoj.

Favore estas, ke nun ankaŭ ekzistas organizaĵo de la esperantistaj gestudentoj, la Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejoj\*). Ĝi hodiaŭ nur ampleksas la esperantistajn aktivulojn studentajn aŭ studentajn, sed ĝi povas esti la bazo por tiu pli granda esperantista studentorganizaĵo de la estonteco.

Kiel ĉiu speciala grupo de esperantistoj havas siajn specialaĵojn, la esperantista studenta organizaĵo kompreneble ankaŭ devas diferencii de la ĝenerala skemo. Ĝi nepre ne devas stari ekster la aliaj studentorganizaĵoj, do eble esti samranga kun la kursoj por stenografio, por la bulgara aŭ baska lingvoj. Ĝia loko devas esti inter la internaciaj kulturaj organizaĵoj studentaj. Tio signifas, ke ĝia ĉefa laboro ne devas esti por, sed per Esperanto. Kiel kutime ĉe ĉiuj studentaj organizaĵoj ĝi devas havi proprajn kunvenojn nur por siaj gemembroj, kaj ĝiaj prelegoj nature devas esti pli sciencaj ol tiuj de ĝenerala loka Esperanto-grupo. Ĝi nepre devas eviti ĉiujn sektajn inklinojn, por ke ĝi ankaŭ povu esti agnoskata de la studentaro kiel samranga kun la aliaj internaciaj kulturaj organizaĵoj studentaj. De la du flankoj de ĝia laboro, la esperantista kaj la studenta, ĝi ĉiam devas observi la studentan flankon kiel plej gravan, sed havi esperantistan bazon.

La preskaŭ samtempa fondiĝo de la internacia scienca organizaĵo, la CED, kaj de la germana Societo kaj de la internacia studenta organizaĵo IFESA povas esti la komenco de nova epoko por la antaŭenpuŝo de la esperantismo, kies unua videblaĵo estas la aktiveco ĉe la UNESCO. Necesas nun, ke ĉiuj esperantistoj komprenu la esencaĵojn de tiu flanko de nia movado kaj helpu ĝin. Se tiuj gesamdeanoj science edukitaj, kiuj hodiaŭ ankoraŭ flankestaras, ĉar ili ne emis esti organizataj en la ĝeneralaj Esperantaj grupoj, kunlaboros en la nove fonditaj organizaĵoj, ili plifortigos tiujn kaj laŭ sia povo helpos al la efektivigado de nia komuna celo.

Werner Bormann  
stud. rer. pol., Kiel

\*) Informoj ĉe la verkinto de ĉi tiu artikolo, adreso: Flensburg-Mürwik, Blücherstraße 17.

## Kiuj radikoj estas oficialaj?

Se oni deziras scii tion, oni hodiaŭ ĝenerale malfermas la Plenan Vortaron kaj rigardas tie. Sed la dua eldono de Plena Vortaro (= PV) elvenis en 1934, kaj ĝi kompreneble ne signifas tiujn vortojn, kiujn la Akademio oficialigis nur poste, en la 5-a kaj 6-a Aldonoj al la Fundamento. Kaj la nuna, tria eldono de PV estas ja nur fotografia kopio de la dua eldono.

Tial ĉi-sube sekvas listo de la radikoj intertempe oficialigitaj; 5 aŭ 6 signifas: 5-a resp. 6-a Aldono. Krome estis oficialigata, nur antaŭ kelka tempo, la sufikso -end-. — La ĉi-subaj tradukoj de la radikoj ne nepre estas la oficialaj; la radikojn mem mi dankas al la afabla informo de s-ro prof. G. Waringhien.

- angor-o 6 Todesangst; Herzens~  
 apertur-o 6 Öffnung  
 aplomb-o 6 Sicherheit (im Auftreten)  
 arbust-o 6 Strauch  
 aŭgur-i 6 vorher/sagen, wahr~ (ursprünglich - in Rom - aus dem Vogelflug; jetzt auch allgemein.) Also Augur = aŭguristo!  
 aŭreol-o 6 Heiligenschein, Aureole, Nimbus (auch figürlich!)  
 aviad-o 5 Flugtechnik (Fliegen mit Flugzeugen); Luftfahrt (= aerveturado)  
 balet-o 6 Ballett  
 bankier-o 6 Bankier  
 brems-o 5 Bremse; also bremsi = bremsen  
 bulnen-o 5 Bulletin, (periodischer) Bericht  
 -end- zu ... en(d), was ge ... werden muß; z. B. pagenda fakturo = eine zu bezahlende Rechnung  
 fon-o 5 Hintergrund, [in diesem Sinne:] (Unter)grund  
 gramfon-o 6 Grammophon, Plattenspieler  
 greg-o 6 Herde  
 honorari-o 6 Honorar  
 ingredienc-o 6 Zutat, Ingredienz  
 kabinet-o 5 Kabinett (auch für „Regierung“)  
 koncesi-o 6 Konzession, Genehmigung; Zugeständnis  
 konduktor-o 6 Schaffner  
 monoton-a 6 monoton, eintönig  
 pil-o 5 elektrisches Element (chemisches); pilaro = Batterie (auch elektra baterio)  
 plagiat-o 5 Plagiat, geistiger Diebstahl  
 slip-o 5 Kartei/zettel, ~karte  
 streb-i 6 streben (nach etwas)  
 susur-i 6 rascheln, knistern, rauschen (leise)  
 ŝrump-i 6 schrumpfen, ein~, zusammen~  
 vink-o 6 Niet(e) [techn.]; vinkti nienten. (Diese Wurzel fehlt im PV!)  
 vivisekci-o 6 Vivisektion, Tierversuch  
 vizi-o 6 Vision, [in dies. Sinne:] Erscheinung

baloto ktp. Kaj ĝi oficialigis tiel multajn radikojn, dum kiam ankoraŭ tiel multaj ne estas oficialaj, kiuj estas ofte bezonataj, kiujn ĉiu uzas jam delonge kaj pri kies formo tute ne povas esti debato. Vi petas ekzemplojn? Jen kelkaj vortoj ankoraŭ ne oficialaj: filmo (!!), kartelo, ĝiro, filistro ktp. Krome ankoraŭ multaj vortoj sciencaj, kiujn ĉiu fakulo uzas, parolante pri la respektiva temo: monografio, morfologio, fenolo (Phenol) ktp. Ili ne estas pli sciencaj ol ekz-e la oficialaj vortoj prozodio, paroksismo, antropologio, monomanio kaj multaj aliaj, — kaj ĉiuj cititaj estas plene internaciaj. (Mi devas aldoni, ke mi ne bezonis serĉi longe por trovi tiujn kazojn; dum dek minutoj mi trovis ilin ĉiujn.)

Kaj oni pripensu, ke eĉ la lasta, la 6-a Aldono estas publikigita en 1935, do antaŭ preskaŭ 20 jaroj. En tiu longa tempo la lingvo riĉiĝis altgrade. Ĉu ne estas urĝa tasko por la Akademio, baldaŭ publikigi novan

aldonon? Kompreneble la Akademio volas esti singarda pri oficialigo de radikoj kaj ne fari trarapidan paŝon. Sed mi supre ja ne piedis por oficialigo de poeziaj fakterminoj k. s., pri kiuj regas disputo. Mi parolis nur pri la vortoj — la multaj vortoj — pri kies formo, signifo, bezonateco kaj uziĝo ne povas esti dubo; PV ja de multaj jaroj sukcese unuecigis la lingvouzon!

Kaj ekzistas plia motivo, kiu devus instigi la Akademion al baldaŭa publikigo de nova aldono: Pro tio ke la oficiala radikaro tiel multe postrestis post la bezonoj de l' vivo, la e-istaro pli kaj pli kutimiĝis, ne plu tre atenti la oficialecon. Oni kontraŭe prenas kiel normon la Plenan Vortaron: kio estas en ĝi, tion „liberalaj“ aŭtoroj uzas senhezite; en la fino de libroj oni indikas la „vortojn ne troveblajn en PV“ ktp. Oni devas tre ĝoji, ke tiel almenaŭ ekzistas internacia normo; sed ĉu tio estis la celo de l' oficialigado, ke oni simple ne atentu ĝin?

Nur per energia „postlaborado“, per nova listo de necesaj oficialaj radikoj, la Akademio povos ree doni al la marko „oficiala“ veran estimon kaj valoron. Hans Wingen

## Hesperanto

la lingvo, parolata de la indiĝenoj de nia ĉi-jara kongresurbo.

Jes, vi ĝuste legis „Hesperanto“, aŭ ĉu vi ne scias, ke Frankfurto situas en Hesslando? Do... vi komprenas, ke oni tie parolas Hesperanton. Certe vi jam spertis, ke kelkaj homoj en la mondo ne komprenas nian Esperanton, sed certe oni komprenas en Frankfurto Hesperanton. Por ke vi iomete eksciuj de tiu lingvo, mi volas doni al vi malgrandan lecionon. Estas simpla afero kompreni, se vi scias, ke Hesperanto havas du diversajn „a“. Unu estas la malfermita klara „a“, kaj la alia estas la „a“, kiun oni nazprononcas, kiel en la franca lingvo. La substrekitaj „a“ do estas la lastnometaj.

en Aamer  
 e Dipphe  
 e Saafenäppche  
 e Schawellche  
 e Funsel

e Dutt  
 Gewerzzel  
 de Geedee  
 de Daafbazze  
 e Kinnerschees  
 e Knott  
 e Lichenern  
 en Worschtzibbel  
 en Fleehbuttz  
 en Schtumber  
 e Ammedeiche  
 e Worzzel  
 e Pitsch  
 e Bambelschnuut  
 en Dobbsch  
 e Kwetsch  
 en Gickel  
 e Hinkelche  
 e derrappisch Diehr  
 e Gaas  
 en Käuwer  
 e Bobb  
 en LäuSZibbel  
 en Kanaljefoochel  
 en Knodderer  
 en Krakeehler  
 en hochgestochene  
 Spookel

sitelo  
 poteto  
 sapujeto  
 piedapogilo  
 malhela lumigilo

papersako  
 suplegomaĵo  
 Gete (la poeto)  
 mono por la baptado  
 infanveturilo  
 hartufo  
 mensogulino  
 la finaĵo de kolbaso  
 hundaĉo  
 puŝo  
 simplulineto  
 radiko  
 marĉeto  
 pendlipo  
 turbo  
 pruno  
 kokviro  
 eta koko  
 maldika besto  
 kaprino  
 skarabo  
 pupo  
 bubaĉo  
 kanario  
 grumblemulo  
 disputemulo  
 fieraĉulo

ein Eimer  
 ein kleiner Topf  
 ein kleiner Seifennapf  
 ein Fußschemel  
 ein schlechter Beleuchtungskörper  
 eine Tüte  
 Suppengrün  
 Goethe  
 das Taufgeld  
 ein Kinderwagen  
 ein Haarknoten  
 eine Lügnerin  
 ein Wurstende  
 ein Kötter  
 ein Stoß  
 eine simple Person  
 eine Wurzel  
 eine Pfütze  
 eine Hängelippe  
 ein Kreisel  
 eine Pflaume  
 ein Hahn  
 ein kleines Huhn  
 dünnes Tier (mager)  
 eine Geis  
 ein Käfer  
 eine Puppe  
 ein Lausbube  
 ein Kanarienvogel  
 brummiger Mensch  
 streitsüchtiger Mensch  
 eingebildeter Mensch

informado sed ankaŭ la sveda UNESKO-konsilantaro decidis kunlabori kun la Sveda Esperanto-Instituto, kiu aranĝos la prelegserion.

Prelegos 6 personoj, nome Ivo Lapenna, Jugoslavio, Julia Isbrücker, Nederlando, Lakshmiswar Sinha, Hindujo, Karl Söderberg, Svedujo, John Stenström, Svedujo, kaj Jan Strönne, Svedujo.

Oni traktos gravajn problemojn, i. a. rilate al la aktuala UNESKO-decido kaj la klopodoj de la diversaj Landaj Asocioj, kiam temas pri la daŭriga laboro.

### Esperanto en la servo de la sveda ŝtato

Ek de la nuna jaro 1953 la Ŝtata Garden-Eksperimentejo en Alnarp, Åkarp, Svedujo — situas kelkajn kilometrojn ekster Malmö en la suda parto de la lando — uzas Esperanton kiel resumlingvon en siaj labor-raportoj. Tiuj aperas plurfoje ĉiujare kaj estas dissendataj al universitatoj, bibliotekoj, ĝardenaj eksperimentejoj kaj similaj en la tuta mondo. Kiel resumlingvon oni ĉiam uzis la anglan, sed de nun oni do flanko de tiu uzas ankaŭ Esperanton.

La ĉefa stacio de la Ŝtataj Garden-Eksperimentejoj (svedlingve: Statens Trädgårdsförsök) situas en Alnarp,

sed multaj flilioj estas dislokitaj en la tuta lando.

En la laborejoj oni faras eksperimentojn, testojn kaj provojn pri fruktoj, beroj, ornamplantoj kaj legomoj. La laboro ampleksas kulturmanierojn, produktadon, reproduktadon, bredadon, sterkadon, semadon, interspacigon, plantadon, akvadon, greftadon, pritrancadon, ŝprucigadon, forcadon, rikoltadon, traktadon de diversaj baztrunkoj, teknikajn problemojn k. t. p.

Estas granda progreso por nia movado, ke ŝtata institucio komencas uzi nian lingvon, kaj dank' al la estro, profesoro Fredrik Nilsson, tio nun estas fakto. Espereble ne-svedoj, leginte la publikigaĵon aŭ tiun ĉi noton, esprimu al la eksperimentejo sian estimon, por ke ĝi konstatu, ke oni ne faris vanan laboron kaj havis senbezonan elspezon. Gardenestro Carl A. Klang iniciatis la aferon kaj ellaboras la Esperanto-tekstojn.

## Auf dem Büchertisch

Einzel eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

**Jarlibro de UEA, 1953: Unua parto.** Format 11×15 cm, 272 Seiten, biegsamer Deckel, gut kartoniert. Nicht käuflich, nur Einzelmitglieder der Universala Esperanto-Asocio erhalten es. UEA, Herongate, Rickmansworth (Herts.), England.


„Alle Jahre wieder“ ist man versucht zu summen, wenn das Jahrbuch der UEA erscheint. Es ist das Werkzeug des Esperantisten, der sich tätig in seiner Welt bewegt.

Sein Inhalt ist, um es vielleicht so umfassend wie möglich auszudrücken, die kondensierte Esperanto-Bewegung. Welche Vertreter hat Esperanto und wo überall, das ist z. B. die den aktiven Esperantisten wohl am meisten interessierende Frage. Aber das ist bei wei-

tem nicht der einzige Inhalt des Jahrbuchs. Alle Daten über UEA, über die Akademie in ihrer jetzigen Zusammensetzung, die Landesverbände, die esperantistischen Veranstaltungen 1953, ein Verzeichnis der sämtlichen Esperanto-Weltkongresse, die Daten über die wichtigsten Fachverbände, eine Liste (und Anzeigen) über die Neuerscheinungen unserer Literatur, eine Liste der zur Zeit erscheinenden Esperanto-Zeitungen und -Zeitschriften und der Esperanto-Verlage — das gibt einen kleinen Überblick über die Reichhaltigkeit des Jahrbuchs.

Das Jahrbuch ist der Schlüssel, der uns die Türen zu den mannigfaltigen Zimmern des Esperantoreiches öffnet, so heißt es ungefähr im Vorwort. Mögen sich viele seiner bedienen, mögen die Benutzer sich aber im Verlauf des Jahres verdoppeln! Nur so wird sich erst der weltweite Nutzen dieses Schlüssels erweisen. Jfb.

## WESTFÄLISCHER PORTLAND-ZEMENT



VERKAUFSBÜRO WESTFÄLISCHER ZEMENTWERKE NEUBECKUM i. W.

# Vidu kaj vidu

Kolektitaj kaj aranĝitaj de J. S.-r

**La verkisto.** „Imagu: kiam hieraŭ mi revenis en mian kabineton, mi trovis mian bubeton sidanta sur la planko kaj disŝiranta ĉiujn miajn manuskriptojn!“ — „Tio ja estas vere miriga, ĉu la etulo jam scias legi?“

**Damaĝo kompensita.** La buĉisto konsultas advokaton: „Se hundo kaptas el mia butikoj pecon da viando, ĉu la proprulo ŝuldas al mi kompenso?“ — „Sendube li devas ripari vian damaĝon.“ — „Bone. Via hundo ŝtelis el mia vendejo viandopecon, kiu valoras du markojn kvindek.“ — „Sekve la honorario por la jura informo estas reduktenda per tiu sumo. Do vi pagu al mi nur du markojn kvindek.“


**Ne nervoza.** „Ĉu vi ne aŭdis, ke mi frapis al sub la plafono?“ — „Certe, sed io tia ne ĝenas nin. Ni mem ja bruas terure.“

**Apotekista geometrio.** „Mi deziras laksigan pilolon.“ — „Kiam ĝi devas efiki?“ — „Tuj.“ — „Kiom longe vi bezonas por iri hejmen?“ — „Kvin minutojn.“ — „Kiom da ŝtuparoj?“ — „Tri.“ — „Kiom ĝis la loketo?“ — „Cirkaŭ dek metrojn.“

La tagon poste la kliento revenas: „Vi prikalkulis hieraŭ la ekefikon de la pilolo admirinde precize, sed damaĝe mi estis forgesinta menci la ŝtupojn antaŭ la altparteroj.“

## Ne ŝovu vazon en fremdan nazon

Verŝajne vi diras: „Ĉi tiun proverbon mi iel konas.“ Certe, — iel. Kaj se vi estas malnova esperantisto, vi nun eble elserĉas la cindruojn kun Esperantaj proverboj, kiun fabrikis in antaŭ la nazia tempo: „Lupo ŝanĝas la harojn, sed ne la farojn“, „Kien diablo ne povas, tien virinojn li ŝovas“... ĉiuj sufiĉe malamikaj proverboj, ĉu ne?... kaj jen ankaŭ „Ne ŝovu vian nazon en fremdan vazon“! Tio do estas la origina formo, sed supre mi iom transformis ĝin. Al mi persone — malkaŝe dirite — la nova formo eĉ pli plaĉas. Ĝi esprimas pli frappe la malpermesitecon de tia agado kaj ĝiajn eventualajn malbonajn sekvojn; post aŭdado de tiu proverbo neniu ankoraŭ riskos, ŝovi vazon en fremdan nazon! Kaj krome mi pensis: Zamenhof ja kreis belan proverbaron por Esperanto, sed io ankoraŭ mankas al ni, kompare kun naciaj lingvoj: ĉu nur ili posedu tiel belajn metamorfozojn de proverboj kiel ekzemple la germana lingvo: „Das schlägt dem Faß die Krone ins Gesicht“, aŭ la angla: „A stith in time gathers no moss“ (el „A stith in time saves nine“ kaj „A rolling stone gathers no moss“)? Kaj mi decidis publikigi kelkajn tiajn ankaŭ por Esperanto: vidu sube. Se ili trovas aprobon, oni eĉ povus oficialigi ilin, en sepa aldono al la Fundamento. (Aŭ ĉu la oficialigo de -end jam estis la



Ĉu vi vidis en Frankfurto ĉi tiun ravan bildon: La Majno dum sunsubiro  
Foto: Dr. Wolff & Tritschler

sepa?) Sed al la esperantistoj seriozaj, kiuj malŝatas tiun mian proponon, mi proponas ion alian: rigardu la sekvantajn „miksitaĵa proverbojn“ kiel enigmojn kaj divenu, kiel ili aspektas vere! Per tio vi rimarkos, kiel... malbone vi konas la Esperantan proverbaron, kara serioza esperantisto. Mi ankoraŭ malkaŝas, ke inter la deksep sekvantaj troviĝas dekunu proverboj kompletaj, kies du partojn oni bezonas nur elserĉi!

Cie estas varme, kiam boto nin premas.

Gasto kiel fiŝo leĝon ne konas.

Pli da okuloj ne estas malhonoro.

Kiu ĉe l' muro aŭskultas, min

mem ne tre ŝatas.

Ne fidu amikon, se ne longe li

restas.

Se malriĉulo sukcesas, li poste

sorton ne riproĉu.

Kiu hundon mian batas, pafilon

prete tenu.

Kiu tro multe deziras, sidas plej

ĝue.

Kion Parizo aplaŭdas, baldaŭ fa-

rigas malfreŝa.

Kie estas gasto, tiun la muro

insultas.

Kiu venas plej frue, mem sin

malbenas.

Pli da bruoj, pli da certeco.

Malsata stomako orejon ne havas.  
Urson evitu, kiu havas jam flikon.  
Petolu, diboĉu, sed duonpatrinon  
ne incitu.

Agrabla estas gasto, kiu neston  
konstruas.

Nazo supren, tie estas Dio.

Kaj kun tiu admono mi adiaŭas.  
Ĉiam via Napo-Leono

## Ni petas pardonon

pro la iom malfrua apero de ĉi tiu  
raporto. Ni nepre volis publikigi  
raporton pri la Germana Kongreso  
en Frankfurt.

Redakcio kaj Eldonejo

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der  
Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg.  
Herausgeber: Ludwig Goppel, Limburg/Lahn.  
Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl,  
Ehrenbergstr. 1. Nachdruck nur mit Genehmigung  
der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich  
1,50 DM zuzüglich — 12 DM Zustellungskosten.  
Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zu-  
schriften für die Redaktion an Joseph F. Berger,  
Köln-Riehl, Bestellungen und Anschriftenänderun-  
gen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH.,  
Limburg/Lahn, Diezer Straße 17, Postscheck-Konto:  
Frankfurt am Main, Nr. 123 82; Bank-Konten:  
Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg,  
Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.

